

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj

#### de la aktuala numero:

Monique Arnaud

Josias Barboza

Mariana Gencheva

Ronald Glossop

Heidi Goes

Gong Xiaofeng

Lajčo Imrić

Lee Jung-ke

Reza Kheirkhah

Zsófia Kóródy

Márta Kovács

Katalin Kováts

Stefan MacGill

Rachel Mafuluko

Alexandrine Omba

Radojica Petrović

Magdalena Tataru

Yu Jianchao

Josef Vojáček



**ilei**



## Scienca Komitato

**Prezidanto: Humphrey Tonkin**,  
Usono, University of Hartford; AdE<sup>1</sup>

**Vicprezidanto: Detlev Blanke**,  
Germanio, Prezidanto de la Societo  
pri Interlingvistiko

### Membroj:

**Vera Barandovská-Frank**, Germanio,  
Universität Paderborn; AIS<sup>2</sup>

**Duncan Charters**, Usono, Principia  
College, Elsah

**Renato Corsetti**, Italio, Università degli  
Studi di Roma „La Sapienza”; AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta**, Barato, LRU, Indian  
Statistical Institute, Kolkata; AdE<sup>1</sup>

**Michel Duc Goninaz**, Francio,  
Université de Provence; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius**, Litovio, Šiaulių  
universitetas

**Wim Jansen**, Nederlando, Universiteit  
van Amsterdam

**Boris Kolker**, Usono; AdE<sup>1</sup>

**Iona Koutny**, Pollando/Hungario,  
Uniwersytet im. Adama Mickiewicza  
w Poznaniu; AdE<sup>1</sup>

**Maria Majerczak**, Pollando, Uniwer-  
sytet Jagielloński w Krakowie

**Geraldo Mattos**, Brazilo, Federacia  
Universitato de Paranao; AdE<sup>1</sup>

**Aleksandr Melnikov**, Rusio, Академия  
Сельскохозяйственного  
Машиностроения

**Radojica Petrović**, Serbio, Univerzitet  
u Kragujevcu

**Balázs Wacha**, Hungario, MTA  
Nyelvtudományi Intézet

**Sekretario: Aida Čižikaitė**, Litovio

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

<sup>2</sup> AIS – Akademio Internacia de la  
Sciencoj, San-Marino

Titolpaĝe supre: *inaŭgura foto de nia konferenco*; malsupre: *ekskurso al la ŝtona arbaro*.

Dorskovrile supre: *grupfoto ĉe nia konferenceto*; malsupre: *membro de la Elekta Komisiono (de maldekstre: Tiekō Isikawa, Ana Montesinos, Aurora Bute)*.

## Enkonduko

### Karaj Legantoj,

Nesurprize, signifa parto de nia numero prezentas nian ĵusan konferencon. Niaj novaj estraranoj laŭvice prezentos enkondukajn artikolojn por IPR – logike, ke la unua en la vico estu Arko, kiu skizas la fonon de la plano inviti nin al Ĉinio. Sekvas raporto de Ĉina Radio Internacia, kaj post tio densigo kaj kunigo de la preskaŭ ĉiutagaj komunikoj kiujn ni dissendis al la esperantistaro. Pritema prelego atendas vin – pliaj sekvos en postaj numeroj. Fine de la konferenca parto, legu kiel ILEI povus daŭre kunlabori kun la Arta Kolegio de Kunming. Tamen, ankaŭ en Eŭropo aferoj bobelas – legu raporton pri plurmonata instruado en Sicilio, prepare al la ĵusa 79a nacia kongreso. Legu ankaŭ pri du novaj projektoj Komenio, kiuj ligos klasojn tra 2012 ĝis 2014.

Legu pliajn raportojn el Azio, Afriko kaj Ameriko. Informriĉa numero – kun ILEI-labortable en la fino. Agrablan legadon!

*Jozefo NĚMETH, redaktoro*

ILEI kaj IPR kore dankas al la estraranoj, kiuj forlasis la postenon en julio. Al nia sekretario, s-ro HUANG Yinbao (Trezoro), pro kapabla prizorgo de voĉdonoj kaj ceteraj taskoj. Al nia kasisto, s-ino Julija BATRAKOVA pro modela kaj akurata prizorgo de financaj bezonoj kaj livero de profesinivelaj jaraj finkalkuloj. Al nia vicprezidanto, d-ro Duncan CHARTERS, pro modela organizado kaj surpieda tradukado/resumado dum nia Kopenhaga simpozio, al Julian HERNÁNDEZ ANGULO, pro vigla samloka kungvido de la Tago de la Lernejo – kaj gitara gajigo de konferencanoj. Ili helpis porti nian ligan tra defiaj kaj malfacilaj jaroj.

SMG/JN

## De reviviĝo ĝis krona atingo

Delonge ekzistis ĉina sekcio de ILEI – ĝi floris tra la naŭdekaj jaroj, prof. ZHANG Danchen estis tiam estrarano de ILEI. Sed depost 2004 la sekcio dormis. ILEI ne nuligis ĝin esperante je reviviĝo. Ĝuste ekde 2007 tio okazis. Post konsultiĝo, prof. ZHANG proponis la sekciestrecon al la subskribinto, kiu akceptis la taskon ekde februaro 2009. La membraro rapide rekreskis – de manpleno ĝis 29, ĝis 69 kaj nun ĝis 89 – la ĉina sekcio nun estas la dua plej granda en ILEI. En 2010 Ĉina E-Ligo pripensis la eblon oficiale fondi organizon por instruistoj. Post preparaj laboroj, Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj (faka komisiono de ĈEL) estis sankciita, kun la oficiala anonco okazinta en decembro 2011, kadre de la 9a Tutlanda Kongreso de Esperanto.

De 2009 ĝis nun la sekcio kunorganizis seson da naciaj aŭ internaciaj kursoj kaj seminarioj. Iuj el tiuj havis amplekson similan al ILEI-konferenco, ili daŭris inter kelkaj tagoj kaj tuta monato, i.a. sur la Esperanto-insulo Hajnano. Tiuj evoluigis en la sekcio la kapablojn necesajn por inviti ILEI-konferencon. Leviĝis la ideo fari tiun inviton en letero de Dennis KEEFE tuj post la unua kurso en Hajnano. Li skribis en marto 2010 al i.a. Arko kaj Augusto CASQUERO, kun la demando ‘Ĉu vi pensas, ke estus bona ideo inviti la ILEI-konferencon al Hajnano en 2012?’ Tio maturiĝis al formala peto, kiun la estraro de ILEI akceptis en aprilo (decido 2011-20). Kvar lokoj estis proponitaj: la insulo Hajnano, Kunming, Nanning kaj Siano (*Xi'an*). La estraro de ILEI poste elektis la urbon Kunming, ĉefe pro la pozitiva konferenceja oferto, la proksimeco al Hanojo kaj klimataj konsideroj.

La preparlaboroj estis multaj, kun plurmonataj E-kursoj en la kolegio tra la printempo, gvidataj de s-ro WANG kaj s-ino YU. Fondiĝis ampleksa teamo de LKK-anoj kiu inkluzivis la respondeculon pri konferencoj en ILEI, s-rob Radojica PETROVIĆ; mi deziras kore danki al ili ĉiuj, ankaŭ al serio da helpemaj kaj kapablaj konferencanoj kiuj plenumis taskojn. Ni ŝuldas grandan dankon al la Arta Kolegio kaj ties prizidanto, s-ro DUAN Yongxing. La konferenco rompis plurajn rekordojn – legu pri tio tra la sekvaj paĝoj. Ni ĝojas, ke Ĉinio povas ludi centran rolon en la nuntempa ILEI!

*Arko (GONG Xiaofeng), LKK-prezidinto kaj nova estrarano de ILEI*

# 45a Konferenco de ILEI en Kunming

## Artoj – lerteco de komunikado

De la 20a ĝis la 26a de julio okazis la 45a Konferenco de ILEI en Kunming, la ĉefurbo de la provinco Yunnan en suda Ĉinio. La gastiganto estis la Kunming-a Profesia Artkolegio. La temo de la konferenco estis: *'Arto de Komunikado, Komunikado de Artoj'*. Entute aliĝis 113 konferencanoj el 19 landoj, kaj ĝi estis vere impona kaj signifplena konferenco en la historio de la ligo, laŭ la takso de Stefan MACGILL, prezidanto de ILEI.

Kunming troviĝas en la sudo de la lando, kutime tre varma en somero, tamen distinge, kiam en Pekino la vetero estas varmega kaj inunda, Kunming restas klimata favora kaj serene friska, pluvetoj de tempo al tempo frekventas la urbon sur la altebenaĵo. La 21an de julio malfermiĝis la Konferenco, en la Salono Zamenhof. La kolegia ĥoro prezentis la himnon „Espero”.

Ĉeestis en la inaŭguro gvidantoj de la provinco Yunnan. La salono estis plena je 300 personoj, multaj el ili estas studentoj de la kolegio. Sinjoro LIANG Gongqing, eksa vicestro de la provinco Yunnan, Honora Prezidanto de la konferenco, faris salutparolon; li esperis, ke la konferenco donos specialan memoron pri la buntaj naciaj kulturoj de la provinco. Same deziris Stefan MACGILL, prezidanto de ILEI, kiu esprimis dankojn al la provinco, al la urbo kaj al la kolegio. Ankaŭ sinjoro DUAN Yongxing, prezidanto de la Kolegio kaj longtempa esperantisto, faris bonvenigan parolon. Li diris: „Mi sincere esperas, ke la konferenco de ILEI okazanta en Kunming akcelos la disvolviĝon de la E-movado en Ĉinio kaj tra la mondo. Mi sincere esperas, ke nia laboro vekos respekton de pli multaj homoj al la egaleco por la homaro.”

La septaga konferenco enkadrigis buntajn programojn: laŭkutime kursojn diversnivelajn, kiel paroliga, konversacia kaj tiuj por infanoj, komencantoj, bazlernejoj kaj progresantoj. Elstaris la kurso *La ĉina eksprese*, kiu instigis la emon de alilandaj konferencanoj saluti ĉine en kaj ekster la konferencujo. La diverstemaj prelegoj des pli allogis interesiĝantojn, ekzemple nepala samideano Bharat GHIMIRE faris prelegon omaĝe al la centa datreveno de Tibor Sekelj *Tibor Sekelj – Nepalo malfermas la pordon*, la japana s-ro HORI Jasuo konigis la legmanieron: *Esperanto-sumoo*, la hispana instruistino Ana MONTESINOS prezentis sian

instrumetodon: *Lingvaj Ludoj* kaj la svisa profesorino Mireille GROSJEAN konigis la *Evoluon de ekzamenoj de Esperanto*, ktp. La korpa ekzercado *Taijiquan* gvidata de la ĉina esperantisto ZHANG Jiping maloscedigis konferencanojn ĉiun matenon.

En forumo, la prezidanto de ILEI referencis al sia skriba saluto kun la titolo: *De historio ĝis vizio – tra nia konferenca temo*. Li asertis, ke en 2012 ILEI povus sojli je grandaj perspektivoj, sed por transsojliĝi ĝi devas superi siajn akutajn malfacilaĵojn: „La potencialon por antaŭeniro sugestas la 16-paĝa dokumento ‘Strategia Vizio’ nun sub diskuto ene de UEA kaj de ĝia komitato en Hanojo. Ĝi lokas nian ligon kerne en la kapablaj planoj, kaj niaj lastatempaj elpaŝoj sur la kampo de instruista trejnado tre bone harmonios kun la celoj el la vizio.”

Estas du brilaj punktoj kadre de la konferenco: la 2-a Internacia Simpozio de Orienta Azio kaj la invitita Universitata Simpozio. En la 2-a ISOA, kvin samideanoj el Ĉinio, Japanio kaj Sud-Koreio prezentis siajn esplorojn pri instruado de E-o kun la ĉeftemo: *Instrua Metodo por Azianoj*, kaj dum la Akademia Simpozio invitita de la konferenco dek specialistoj faris altnivelajn prelegojn ĉirkaŭ la ĉeftemo: *Arto de Komunikado, komunikado de Artoj*, interalie ses el superaj lernejoj de la provinco Yunnan kaj kvar el niaj konferencanoj. Menciindas la vigla diskutado post la prelegado. Oni profundiĝis en esploron pri la ĉeftemo.

Efike iris la komitataj kunsidoj. Nova estraro estas elektita. La ĝisnuna prezidanto restas en tiu posteno. Kuraĝige estas, ke sinjorino GONG Xiaofeng (Arko), prezidanto de ĉina sekcio de ILEI, estis elektita kiel membro de estraro, kaj sekve de la lasta komitatokunsido, la tria nova azia landa sekcio estis akceptita – Nepalo. La aliaj du sekcioj, Vjetnamio kaj Mongolio, estis pli frue akceptitaj.

Unuafoje la ILEI-konferenco okazis en Ĉinio. La konferenco hardis ĉinajn esperantistojn en la lingva nivelo, organiza kapablo kaj ĝeneraliga potenco. Danke al la Kunming-a Profesia Artkolegio, la konferenco sukcese disvolviĝis kaj ankaŭ abundis artaj prezentadoj fare de profesiaj artistoj, ekzemple la bonveniga koncerto kun mirinde kaj memorinde alta nivelo. Imponis kaj la artisma kaj la teknologia lerteco, en prezento de dancoj, kantoj kaj bildoj el plej diversaj nacimalplimulto logantaj en la provinco. La amuzaj vesperoj internacia kaj azia montris artan talenton de konferencanoj mem.

Vespere de la 26a, post la *Lingva Festivalo* kun 19 lingvoj inkluzive de kelkaj ĉinaj dialektoj, venis la solena fermo de la Konferenco.

La prezidanto de ILEI kaj la prezidanto de la Profesia Artkolegio kune martelis por deklari, ke la 45-a Konferenco de ILEI sukcese fermiĝis, ondis aplaŭdo en la granda salono Zamenhof. La finon markis adiaŭaj kantoj en E-o, prezentataj de la kolegia ĥoruso, dum kiu videblis fone sur giganta ekrano centoj da profesinivele faritaj fotoj el la konferenca semajno. Oni vere ĝuis la konferencon, plenan de arta etoso, bela artfajro impone kronis la noktan ĉielon, la konferenco kulminis en la spektaklo ĝis la fina momento.

*adaptita de raporto farita de s-ino YU Jianchao, por Ĉina Radio Internacia*

## Tra la konferenca semajno

### Malfermo de la ILEI-konferenco

Tridek-persona koruso bonvenigis la pli ol cent konferencanojn komence de la malfermo per vigla interpreto de la Esperanto-himno. Podie sidis naŭ solenuloj, ses personoj alparolis la 300-kapan publikon – temis pri komplete plena salono. Eĉ kun dulingva prezentado, la ceremonio restis ĝis minuta precizeco ene de la anoncita unu horo. La unua preleganto estis la antaŭa vicestro de la provinco Yunnan, s-ro LIANG Gongqing, kiu fermis siajn salutojn priskribante la provincon: ‘Ĉi tie estas okulfrapaj belaj artoj de diversaj nacioj, buntaj popolaj bildoj de diversaj nacimalplimulto, kun briloj de longa historia kulturo.’

Responde, la Prezidanto de ILEI dankis al s-ro LIANG pro la bonvenigo kaj la provinca apogo por la konferenco. Krome dankon ricevis s-ro DUAN Yongxing, longtempa esperantisto kaj Prezidanto de la gastiganta Profesia Artkolegio de Kunming, pro la signifa materia kaj arta helpo de la kolegio por nia aranĝo. Sekvis skizo de la historio de ILEI-konferencoj – ĝis 2006 ĉiuj eŭropaj krom tri. Ekde 2007 okazis tutmondiga eksplodo, kulminanta en la Kunming-a konferenco. La saluto venis al fino per pensoj pri arto kaj komunikado: la konferenca temo.

Trie, parolis en E-o la prezidanto de la kolegio, kiu ricevis ĉinan tradukon. Li diris interalie: ‘Lingvo, kiel ilo de amasa komunikado, karakteriziĝas ofte per kunfandiĝo de pensoj kaj karamboloj de saĝo-

fajreroj. Esperanto, kiel ponto inter lingvoj, dissemas ideojn de espero, paco, amikeco kaj amo.’

Nome de la organiza komitato, parolis s-ino GONG Xiaofeng (Arko), kiu aldonis sian bonvenigon al la partoprenantoj el 19 landoj. La landajn salutojn prezentis du personoj: Bharat GHIMIRE el Nepalo, reprezentante la aziajn sekciojn, kaj Aurora BUTE el Rumanio, nome de la ne-aziaj. Antaŭ la solena malfermo, en akcepto por la ĉinaj gastoj, kiuj inkluzivis la nunan vicestron de la provinco Yunnan, ni tuŝis la deziron de la provinco kaj de la kolegio vastigi siajn artajn kontaktojn pere de Esperanto al landoj, kie tiuj ne ekzistas. Temu pri reciprokaj studvizitoj aŭ livero de art-instruistoj. En ĉi tiu regiono ni havas malferman sintenon al Esperanto kaj eblojn demonstri ĝiajn praktikajn eblojn.

## **La bonveniga arta spektaklo**

Post la malfermo, la Kolegio regalis la konferencanojn per bonveniga koncerto, kun mirinda kaj memorinda nivelo. Imponis la artisma kaj la teknologia lerteco, en prezento de dancoj, kantoj kaj bildoj el la dudekkvino da nacimalplimulto logantaj en la provinco. Al la ĉ. 90 konferencanoj aldoniĝis ducento da kolegiaj studentoj kaj instruistoj. Legu kelkajn impresojn:

„Mi spektis la bonvenigan artan prezentadon kun granda plezuro; precipe la drakodanco, kiu estis farita de gestudentoj de la artkolegio, kortuŝis min.”

*Han Sug Heui, el Koreio.*

„La Bonvenigan Prezentadon mi ege ĝuis. Mirinda fakto estas, ke la prezentantoj de kantoj kaj dancoj en belaj tradiciaj kostumoj estis ĉefe studentoj. La nivelo de la prezentaĵoj tamen estis tre alta. Mi ĝuis ankaŭ la bildojn de tipaj pejzaĝoj de la provinco Yunnan montratajn surekrane.”

*Tieko Išikawa, el Japanio*

„Se ili estas ankoraŭ studentoj, mi ne klare vidas, kion ili ankoraŭ bezonas lerni. Preskaŭ ĉiu el la eroj povus prezentiĝi en prestiĝa londona teatro kaj homoj volonte pagus por vidi ilin, kaj poste ilin rekomendus al siaj konatuloj. Ne nur la artistoj estis elstaraj kaj allogaj, la vestaĵoj, kaj entute la prezento estis ege profesia. Eĉ post mia eliro el la teatro, mi ankoraŭ restis forte emociita pro la beleco kaj talento, kiujn mi ĵus ĝuis.”

*Ana Montesinos, el Britio*



„Duhora programo estis mirinde zorgeme, lerte farita. Ĝi sukcesis prezenti tradiciajn trajtojn de multaj etnoj, kiuj vivas en Yunnan. Kiam aperis kvar viroj sur la podio (vidu la bildon), la sento estis, ke alvenas saluto tamen iel modernigita el tre foraj tempoj pri la montara vivo. Impona estis ankaŭ mongola instruisto, kies prezento montris konstantan bezonon rigardi ĉu alvenos batalontoj, oni devus montri aŭ ŝajnigi sian fortecon kaj potencon.”

*Synnove Mynttinen, el Finnlando*

„Nepalo estas lando de diverseco. Loĝas en ĝi 100 etnaj grupoj. Multaj etnaj grupoj havas similajn dancmanierojn kaj vestaĵojn. Do, mi sentis min hejme dum la prezentado. Mi pensas, ke la socia bazo de Nepalo kaj Ĉinio estas preskaŭ sama.”

*Indu Devi Thapaliya, el Nepalo*

Temas nekontesteble pri la plej altkvalita kaj ampleksa arta prezentaĵo iam ajn okazigita kadre de Konferenco de ILEI. Tre konvena al la konferenca temo: ‘*La arto de komunikado, komunikado de artoj*’.

## **Universitata Simpozio – ĉine kaj Esperante**

ILEI, kadre de sia konferenco, strebas starigi kontaktojn kun ne-esperantistaj universitatoj. Tio realiĝis denove en Kunming, en tuttaga simpozio kun deko da prezentantoj, ĉiu prilumanta iun aspekton de la kongresa temo, kiu aparte aktualas en la provinco Yunnan, kiu entenas loĝantojn kun ĉ. 25 etnaj grupoj, la plimulto kun apartaj lingvoj, alfabetoj, kutimoj kaj artformoj. Grandas la bezono por komunikado inter tiuj malplimultoj.

La prelegoj estis prezentitaj kaj en la ĉina kaj en E-o. Tradukoj estis montritaj ekrane por permesi seninterrompan paroladon kaj resti ene de tempolimoj. La 150-seĝa aŭditorio estis plena; diskutoj viglis en la post-tagmezaj sesioj. La programo jenis:

Prof. LIU Xuxiang, Universitato de Yunnan, Instituto de Supera Edukado:  
„*Edukado en transkultura komunikado*” (ĉinlingve)

Penny VOS, Jennifer BISHOP, ILEI, Aŭstralio:  
„*Invito al la Tuta Vasta Mondo*” – nova projekto kaj instruplano (en E-o)

XU Shaohua, vicprofesoro de la Teknologia Universitato de Kunming:  
„Konfrontiĝi al problemo: studo de kulturaj diferencoj en la transkultura komunikado inter Ĉinio kaj la Okcidento” (ĉinlingve)

Ronald J. GLOSSOP, ILEI, Usono:  
„Kiel artistoj povas antaŭenigi pacan mondon” (en E-o, vidu paĝon 14)

S-ro YUAN Hongyu, prezidanto de Yunnan-a Esperanto-Asocio:  
„Yunnan bezonas Esperanton” (ĉinlingve – videbla en la enira paĝo de nia retejo kun mapoj kaj bildoj - ĝi donas koncizan superrigardon pri la kultura, lingva kaj etna bunteco de la gastiganta provinco.)

Mireille GROSJEAN, ILEI, Svislando:  
„Klasinterŝanĝoj: konatiĝstrategio kun lingva, socia kaj kultura aspektoj” (en Esperanto)

S-ro ZHOU Hong, docento, PhD-kandidato, Universitato de Yunnan,  
„La akordo de la animo kaj artoj” (ĉinlingve)

DU Shengyan kaj LI Mei, magistras kandidatoj:  
„Lingvo kaj personeco” (ĉinlingve)

S-ino XIE Min, docento, La profesia artkolegio de Kunming:  
„Scioj – Konsento – Rekonno: Artaj Valoroj en la Transkultura Komunikado” (ĉinlingve)


Alan BISHOP, Monash University, Victoria, Aŭstralio:  
„La edukado pri valoroj en matematikaj kaj sciencaj klasĉambroj” (Esp-e).

## Atingoj de la komitato kaj elekto de nova estraro



Ĉeestis fizike 17 personoj en la komitato, sed ili kune esprimis 30 komitatanajn voĉojn. Protokolis s-ro LEE Jung-kee el Koreio. Ĝi konfirmis la tagordon por la tri sesioj, konfirmis la 26 rete faritajn decidojn de la antaŭaj 15 monatoj kaj esprimis kontenton pri reta voĉdonado. Du honoraj membroj estis per aklamado akceptitaj – s-ro LI Shijun (Laŭlum) [vd *maldekstre*] kaj s-ro LI Weilun, ambaŭ el Ĉinio. La komitato akceptis tri modifojn al la Interna Regularo, por antaŭenirigi ĝian plibonigadon. Antaŭ ol trakti aliĝ-

petojn de novaj sekcioj, ĝi nomumis novan komisiiton pri aliĝpetoj, Mirejon Grosjean, inter kies taskoj estas kontroli la statuton de kandidataj sekcioj kaj gvidi ilin en la peto-preparado (vidu la taskpriskribon en nia retejo sub ‘*Dokumentoj*> *Gvidiloj*’). Petoj alvenis el Mongolio kaj Vjetnamio kaj estis akceptitaj sub la kondiĉo, ke la komisiito ricevu la sekcian statuton. Peto de Nepalo estis enordigita ĝis la fino de la konferenco kaj ankaŭ akceptita. Fine de la unua sesio, la komitato akceptis la proponitan konsiston de la Internacia Ekzamena Komisiono por la periodo 2012-2015. La nova sekretario de IEK fariĝis Karine ARAKELIAN el Armenio. Ĉio tio ene de 90 minutoj!



*Li Weilun, nia alia nova honora membro (dekstre) instruas la ĉinan en Kunming, dum maldekstre Yasuo HORI prezentas la japanan*

Komence de la dua sesio, la prezidanto de la kolegio alparolis la komitaton, esprimante deziron por evoluigo de artaj kontaktoj pere de Esperanto. ILEI disponigos konkretajn proponojn pri tio. Diskutita estis la Strategia Vizio proponata de la tiutema komisiono de UEA kaj ĝiaj perspektivoj por eduka progreso; subtena interna rezolucio estis per aklamado akceptita en la fermo. *[vidu la sekvan paĝon]*. Ligaj planoj por koherigi la nunan ofertan de instruista trejnado venis dum diskuto; tiuj aspiroj pri oficiala rekono por tia kapabligo bone enkadriĝos en la novan vizion. Sekvis diskuto pri la

Jarraporto kaj la financaj rezultoj el 2011; per ties akceptoj la komitato senŝarĝigis la malnovan estraron. Post paŭzo la prezidanto de la elekto-komisiono, s-ino Aurora BUTE, transprenis la gvidon por la elekto de nova estraro. La rezulto videblas sur la dua kovrilpaĝo de la revuo. La komitato altigis la proponatan nombron de estraranoj de 8 al 9; temas do pri la plej granda estraro iam ajn, la plej geografie distribuita (personoj el kvar kontinentoj), la plej renovigita (6 novuloj) kaj la plej virina (5 el 9). Fine de la kunsido, la prezidanto kaj la komitato kore dankis al la malnova estraro pro la farita laboro, ili dankis al la elekto-komisiono pro la modele gvidita elekto-procezo kaj la komitato bondeziris al la nova teamo sukcesan laboron.

## **Rezolucio de la ILEI konferenco en Kunming**

La 45a Konferenco de ILEI, okazinta inter la 20a kaj 26a de julio 2012 en Kunming, Ĉinio, kun 113 aliĝintoj el 19 landoj:

- Deklaras sian entuziasman apogon al la nune diskutata Strategia Vizio de UEA; la Ligo kunlaboros en ĝia kompletigo en la formo de Strategia Plano.
- Apogas la vizian reliefigon de demokrata decidado en la Asocio, la klaran elstarigon de ĉefaj agadkampoj kaj de la aktivigo de membroj kaj de la landaj kaj fakaj asocioj.
- Subtenas la eneston de la grava principo de lingva justeco kaj proponas enkadrigi ĝin en la ideon de tutmonda solidara socio.
- Bonvenigas aparte la specifecon de la vizio, kiu antaŭvidas konkretajn subcelojn, kiuj estu realigeblaj, mezureblaj kaj ambiciaj.
- Kaj laŭdas forte la planojn dediĉi pli el la asociaj rimedoj al progreso en la kernaj agadkampoj, inter kiuj klare troviĝas la edukado kaj instruado.

La lasta sesio sekvis tuj post forumo pri la estonta agado. Leviĝis propono por nova membro-kategorio por la plej nepagipovaj landoj. La estraro

senprokraste evoluigis la proponon, kiu, depende de komitata voĉdono, povos realiĝi eĉ por 2013. La eblaj lokoj por niaj postvenontaj konferencoj vekis viglan opini-interŝanĝon; aŭdeblis entuziasmo por Konferenco en Argentino en 2014, kies antaŭkondiĉo estos la baldaŭa fondo de sekcio. Restas la deziro konferenci denove en Afriko, eventuale iel kunlabore kun TEJO. 2015 temos verŝajne pri eŭropa konferenco proksime al la centa UK, kiu mem estas ne findecidita. Ja temos pri elektoĵaro en ILEI.

## **Ekskursaj bunto, Azia simpozio, kursoj kaj prelegoj**

Konferencanoj povis elekti el pluraj ekskursoj, kiuj estis zorge planitaj por ne kolizii kun esencaj konferencaj programeroj. La tuttaga ekskurso allogis la plimulton de la konferencanoj, kiuj estis ravitaj de la pejzaĝa belo de la ŝtona arbaro, tri-kvadrat-kilometra tereno kie densas la karstaj rokformacioj tipaj en la regiono. Pri la dua ISOA (Seminario pri Orienta Azio) vi povis jam legi en la raporto de ĈRI, kiel ankaŭ pri pliaj prelegoj kaj kursoj kiuj abundis tra la konferencaj tagoj. Memorinda estis la bankedo, aranĝita, kiel ankaŭ la ceteraj manĝoj, laŭ bufeda stilo.

## **Fino bonega, ĉio bonega**

Lastatage okazis sukcesa *Lingva Festivalo*, sub la gvido de Ana MONTESINOS, en kiu estis prezentitaj 18 lingvoj, inter kiuj diversaj variantoj de la ĉina, kio altiris ankaŭ studentojn el la kolegio.

La impona ferma ceremonio (denove antaŭ plena salono) enhavis dankojn kaj donacojn – al la kolegio, LKK, prelegintoj, komitataj kaj pliaj helpintoj. Restis ĉe la ĉina sekcio kaj la kolegio bona kolekto de ligaj eldonaĵoj. Lastan prelegan lokon ricevis la prezidanto de la arta kolegio, s-ro DUAN Yongxing, kiu en Esperanto elkore gratulis nin pro la fruktoplajn rezultoj de la konferenco kaj la simpozio. Fine de la parolo la du prezidantoj kune deklaris la fermon de la konferenco.

Ĉio finiĝis per tridek-kapa koruso, kiu kantis la himnon laŭ vigla interpreto; tio estis la komencpunkto por konferencfina koncerto, bunta je kantoj kaj dancoj. La finon ornamis adiaŭaj kantoj en Esperanto, dum kiuj videblis fone sur giganta ekrano centoj da profesinivele faritaj fotoj el nia konferenca semajno – bela memorigo pri la neforgeseblaj tagoj kune pasigitaj. Kronis la vesperon piroteknikaŭa spektaklo tuj ekster la koncertejo.

*Resumis el la diversaj komunikoj: Stefan MACGILL Prezidanto, ILEI*

## **Kiel artistoj povas antaŭenigi pacan mondon**

*prelego de Ronald J. GLOSSOP, Usono, <rglossop@mindspring.com>  
en Kunming, Ĉinio, 25 julio 2012*

En ĉi tiu prelego mia celo estas sugesti al artistoj de ĉiuj specoj tri temojn kiujn mia opinio ili povus uzi por antaŭenigi pacan mondon. Ĉu la artisto estas muzikisto aŭ pentristo aŭ verkisto de literaturo aŭ skulptisto aŭ poeto aŭ fotografisto aŭ alia speco de artisto, mi opinias ke oni povus per ĉi tiuj tri temoj kuraĝigi la homaron labori pli avide por mondo, kiu estas pli justa kaj pli paca.

La unua temo estas la unueco de ĉiuj homoj, eĉ kvankam ni eble vivas dum malsamaj periodoj kaj loĝas en diversaj landoj kun malsamaj kulturoj. Ni ĉiuj estas homoj kaj membroj de unu granda homa familio. Pro tio ni devus kunlabori por la bonfarto de la tuta homa familio. Neniu elektas kiam oni naskiĝas aŭ kie oni loĝas dum la infanaĝo. Neniu elektas esti inteligenta aŭ talenta, malinteligenta aŭ handikapita. Tial tiuj kiuj estas pli bonŝancaj, devus helpi tiujn, kiuj ne estas tiel bonŝancaj.

La dua temo estas la defio konservi nian kolektivitan hejmon, la Teron, por ke ni kaj ĉiuj specoj de vivantaj estaĵoj povu daŭre vivi. Estas almenaŭ tri partoj de ĉi tiu problemo. Unu estas la kvanto de homoj, kiuj povas vivi sur la planedo. En la jaro 1927 estis 2 000 milionoj da homoj sur la Tero. Estis 4 000 milionoj en la jaro 1975, 6 000 milionoj en la jaro 1999, kaj 7 000 milionoj en la jaro 2011. Ŝajnas ke estos 8 000 milionoj da homoj en la jaro 2025 kaj 10 000 milionoj en la jaro 2083. Kiom da homoj la planedo Tero povos vivteni? Se estus tro da homoj, ĉu ne estos militoj kaj perfortaj konfliktoj? Por konservi la Teron kaj la pacon inter homoj ni ĉiuj devas decidi havi nur unu aŭ du idojn. Dua parto de la problemo estas la kvanto da rimedoj, kiun ĉiu persono uzas aŭ malŝparas. Aparte grava afero estas la kvanto da pura akvo, kiun ĉiu homo bezonas. Ni devas trovi pli bonajn metodojn por konservi puran akvon kaj purigi malpuran akvon. Tria parto de la problemo estas la kvanto da poluo, kiun la homaro produktas, aparte de karbon-dioksido kaj de aliaj aĵoj, kiuj kaŭzas ĉiam pli varmiĝon de la Tero. Ni homoj devas trovi kaj uzi aliajn fontojn de energio krom karbo kaj petrolo.

La tria temo estas la bezono konstrui bonajn politikajn instituciojn, por ke la konfliktoj, kiuj ĉiam povas okazi inter individuaj homoj aŭ grupoj de homoj, estu solvitaj pace kaj senperforte. Tiaj konfliktoj devus esti

decidataj laŭ politikoj kaj leĝoj kolektive starigitaj de la tuta komunumo. Ni ne volas havi anarkion kaj la sekvajn perfortajn batalojn, kiuj sen registaro okazus en niaj urboj, niaj provincoj, niaj landaj, kaj nia mondo. Bedaŭrinde registaroj ne ĉiam estas bonaj registaroj, sed manko de ia ajn registaro preskaŭ ĉiam estas malbona situacio. Por konservi pacon en niaj homaj komunumoj, ni devas havi bonajn popularajn registarojn. La homaro bezonas bonajn registarojn, kaj por la diversaj landaj komunumoj kaj por la tutmonda komunumo. Por havi pacon interne de lando kaj por pritrakti la problemojn alfrontantajn la landan komunumon, ni devas havi bonan landan registaron. Por havi paceman mondan kaj por pritrakti la problemojn alfrontantajn la tutmondan komunumon, ni devos havi veran tutmondan registaron. Unuiĝintaj Nacioj estas paŝo al tia celo, sed ĝis nun nia tutmonda homara komunumo ankoraŭ ne havas veran mondan registaron. Sekve ni ankoraŭ havas multajn militojn kaj aliajn gravajn tutmondajn problemojn, kiuj ne ricevas sufiĉe da atento.

Mi nun volas menciigi kelkajn ekzemplojn pri tio, kiel artistoj jam efektive uzis la unuan temon, kiun mi sugestis. Bonega ekzemplo estas la fama ekspozicio de 503 fotoj kolektita kaj aranĝita de Edward STEICHEN kaj helpantoj kiel Wayne MILLER, titolita LA FAMILIO DE LA HOMARO, kiun oni kolektis por la Muzeo de Moderna Arto en Novjorko dum la unuaj kvin monatoj de la jaro 1955. Dum la postaj ok jaroj oni montris tiun ekspozicion en 37 landoj en ĉiuj kontinentoj. Tiu impona kolekto de fotoj iĝis havebla en magazina versio kaj poste videbliĝis per la interreto.

La karaktero de tiu fota kolekto estas bone priskribita de la poeto Carl SANDBURG en sia prologo en la magazina versio. Li diris: „Jen oni vidas fotojn de beboj naskiĝintaj, mamnutrataj, kreskantaj iĝi gejunuloj maltrankvilaj kaj dubemaj. Poste kiel plenkreskuloj ili serĉas kaj esperas. Ili sekskuniĝas, laboras, fiŝkaptas, kverelas, kantas, batalas, preĝas, agadas simile en ĉiuj diversaj mondopartoj ...”

La ekspozicio LA FAMILIO DE LA HOMARO estas bona ekzemplo de tio, kion artistoj faris rilate al la unua temo kiun mi sugestis, sed ankaŭ estas aliaj ekzemploj kiel la konata infana kanto „Estas Malgranda Mondo (Malgraŭ Ĉio)” uzita de la kompanio Walt Disney en siaj distraj parkoj en Tokio, Parizo, Hongkongo plus Kalifornio kaj Florido en Usono. Alia ekzemplo estas la kanto „Ni Estas la Mondo”, komponita en 1985 de Michael JACKSON kaj Lionel RICHIE por la benefika koncerto aranĝita por gajni monon por tiuj, kiuj suferas pro malsatego en Afriko.

Post 25 jaroj tiu kanto estis reviziita por alia bonfarema evento „Ni Estas la Mondo 25 por Haitio” post la ruiniga tertremo de 2010 en tiu lando.

Mi volas fini ĉi tiun prezentadon per la mencio de ne vaste konata ekzemplo de la antaŭenigo de monda paco per la uzo de la ideo, ke ni ĉiuj apartenas al unu homa familio. Mi pensas pri la lasta strofo de kanto en E-o por infanoj, kiuj ĵus komencis lerni la lingvon. La unua strofo de tiu kanto estas pri la fakto, ke ruĝa pomo estas frukto. Aliaj strofoj estas pri aĵoj de aliaj koloroj. Sed la lasta strofo, komponita de Charlotte KOHRS, fondintino de la organizaĵo „Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo,” evidentiĝas la kernan ideon de E-o. Oni povas trovi la kanton en la retejo de „Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo” ĉe <http://icxlm.org/rugxpomo.htm>. Jen la lasta strofo: „Sur la Tero, bela Tero, Loĝas ni, Kantas ni, Kune sur la Tero, Monda familio, Famili’, famili’.” Mi esperas, ke ĉiuj artistoj uzos sian talenton por antaŭenigi mondon kun paco kaj justeco kaj ke la tri temoj, kiujn mi sugestis, estos helpemaj al ili por trovi manierojn por atingi tiun celon. Mi ankaŭ esperas, ke ili helpos informi la homojn de la mondo pri E-o, la relative nova tutmonda lingvo kiun oni povas lerni multe pli rapide ol aliaj lingvoj. Se la homoj de la tuta monda komunumo lernus E-on, ni ĉiuj povus komuniki unu kun la alia, kaj tio certe antaŭenigus paceman mondon.

## **Mirinda loko, kie vere disvolviĝas la komunikado de artoj**

*Jen la temo, laŭ kiu disaŭdiĝis pere de Ĉina Radio Internacia 10-minuta intervjuo kun la prezidanto de ILEI, farita dum la konferenco en la 25a de julio. Ni prezentas nur fragmenton, la plena transskribo legeblas en nia retejo, ĉe [Agado>Konferencoj>45a Konferenco](http://esperanto.cri.cn/641/2012/08/10/1s139436.htm).*

*Ĝi estas aŭskultebla ĉe: <http://esperanto.cri.cn/641/2012/08/10/1s139436.htm>*

*La fragmento, responde al invito intervjuofine paroli pri io ajn, tamen restis ĉe la konferenco kaj priskribas personan momenton, forte impresan.*

*YU Jianchao: Fine ni petas, ke vi parolu pri io nedemandita, eĉ ne rilata al nia konferenco.*





*Stefan MACGILL:* Mi deziras diri, ke ĉi tie la loko estas vere mirinda! Eĉ antaŭ kvardek minutoj, mi havis tre belan sperton. Mi estis reen promenanta, kaj en la ekzercosalono por dancado okazis leciono kaj agado, kvankam ĝi ŝajnis sufiĉe malformala – estis dancantoj farantaj sufiĉe modernajn dancajn stilojn. Tio ŝajnas al mi mirindaĵo, kiam oni kombinis la tradician dancadon kun la absolute modernaj dancspecoj. Du knaboj dancis kaj aliaj sidis ĉirkaŭe kaj rigardis. Iu knabino leviĝis kaj komencis danci kun ili. Mi pensis, ho, ŝi eble estas ĝoja je ĉio ĉi, ke estis

tiom emociita ke ŝi iris kundanci kun ili. Sed poste mi komprenis, ke ŝi estas la instruisto, ĉar ŝi dancis dekoble pli elegante kaj profesie ol ili. Ili estis klare trejnatoj. Mi restis tie dudek minutojn. Tio estis instruado, edukado pri la arto, kio estas ĝuste mia temo! Tie mi vidis ĝin vere disvolviĝi kaj mi trovis tion absolute fascina, kiel ŝi en apenaŭ disciplinita etoso gvidis ilin, helpis ilin, demonstris al ili kiel pli bone fari.

*YU:* Dankon!

*[Surfote: Stefan MACGILL en la malfermo]*

## **Nun, ni montru, ke Esperanto praktike utilas!**

La Profesia Artkolegio de Kunming deziras altiri el aliaj landoj kvalifikitajn fakajn instruistojn por la sekvaj kampoj: akustiko, baletoj, piano, filmado k.a. Ĝis 20 personoj estos akcepteblaj por tiuj postenoj. Ĝis pliaj 30 muzik-instruistoj estos akcepteblaj por instrumentoj kiaj violono, violonĉelo, kontrabaso, fluto, hobojo, klarneto, fagoto ks. La labortempo estas 5 tagoj semajne, 8 horoj tage, aŭ 20 lecionoj semajne, tra 10 monatoj jare (kun 11 salajroj). Salajroj varios de 400 ĝis 1000 usonaj dolaroj monate, depende de la kvalifikoj, kun aldonaj kompensoj de vojaĝkostoj inter 700 kaj 900 USD, kun krompagoj por partopreno en oficialaj prezentadoj de la kolegio. La kolegio liveras loĝadon. Kontakti la prezidanton por pli detalaj informoj.

## ILEI vidigis sin en la UK

La liga vizaĝo montriĝis plurloke tra la 97a Universala Kongreso en Hanojo, Vjetnamio. En la interkonvespera *Movada Foiro* la vizaĝo estis ĝuste tiu de la prezidanto – pasis kaj salutis i.a. junuloj el Vjetnamio kaj Indonezio, kiuj ricevis ekzemplerojn de Juna amiko. Tiu sama liga vizaĝo ricevis la kutiman 3-minutan salutorajton en la posttaga inaŭguro – temis ĉefe pri rezultoj el Kunming kaj ties rezolucio, kiu esprimis fortan apogon al la Strategia Vizio.

Ekde lundo funkciis ILEI-budo, feliĉe tie deĵoris roto da diversaj vizaĝoj. Marde, premis la devoj. Komence, IKU-prelego. Tuj poste la seshora ‘Tago de la Lernejo’ pri kiu legu sube, kaj tuj post tio la subkomitata kunsido de UEA pri edukado. Ĵaŭde okazis la faka kunsido de ILEI, kiu ĉefe servis prezenti la ligon al nemembroj kaj por diskutado pri malfacilaĵoj en la instrua kaj organiza laboro.

### Ses horoj pri la arto instrui

La *Tago de la Lernejo* sukcese pasis en la 97a UK en Hanojo. Ne temis pri amasa aranĝo – en la plej bona momento kunestis kvardeko da partoprenantoj. Ja temas pri iom negranda UK. La taga temo estis ***La arto instrui – instrui pri artoj***, kiu paŭsis tiun de la ĵusa ILEI-konferenco en Kunming.

En la malfermo salutis la prezidanto de ILEI kaj la vic-prezidanto de UEA, s-ino Claude NOURMONT, kiu samtempe respondecas en UEA pri edukado. Post tio sekvis serio da intervenoj, inter 20- kaj 30-minutaj. La ‘festparolon’ plenumis Stefan MACGILL, kiu unue konigis la novan ILEI-estaron kaj prezentis la novajn ĉeestantajn estraranojn. Poste li filozofumis pri la temo de la tago – kiomgrade la instruado estas arto, kaj kiom serio da teknikoj; kaj nia devo instrui ne nur la lingvon, sed ankaŭ pere de ĝi instrui aliajn aferojn, inkluzive la artojn. La programo plie disvolviĝis jene:

#### En la unua parto: la arto instrui

*La arto trovi lernantojn: 125 kursoj en la 125-a jaro* – varba sukceso pli gravas ol la instrumentado. – D-ro Renato CORSETTI, prezidanto de IEF (Italio)



*Kial mankas ellernintoj post longa kaj vasta instruado de E-o en ĉinaj altlernejoj?* – WANG Tianyi, prezidanto de IKEF (Ĉinio)

*Aparta arto instrui E-on (en la E-insulo, Hajnano)* – PENG Zhengming (Trigo, Ĉinio)

*Arto-ŝoko* – instruado pri la pentristo Vincent van Gogh – D-ino Katalin KOVÁTS, redaktoro de *www.edukado.net* (Nederlando/Hungario)

*E-o trans lingvoinstruado* – pri la graveco montri la ĝuon de E-lernado. – Prof. Sasaki Teruhiro (Japanio):

*KER-ekzamenoj tutmonde* – D-rino Katalin KOVÁTS (NL/HU)

*Projekto „Vizito al la Tuta Mondo”*. (La plejlasta projekto de nova estrarano de ILEI, Penny Vos). – Jennifer BISHOP, direktoro pri edukado por AEA (Aŭstralio)

*Kurso 125 – invito grimpi la didaktikan ŝtuparon de tiu kreata kurso.* – Stefan MACGILL (Hungario/Nov-Zelando)

### **En la dua parto: instrui pri artoj**

*Per E-o por artaĵo, por E-o per artaĵo.* – Jasuo HORI, estrarano de Japana E-Instituto.

*La arto instrui luktartojn.* – Mireille GROSJEAN (Svislando)

Per tio, kaj iom da konkluda diskuto, la tago (preparita kaj gvidita de Aurora BUTE) venis al kontentiga fino.

*laŭ la samtage sendita gazetara komuniko pri la Tago*

# „ Esperanto estas materio ”

(Spertoj de lerneja gasteinstruistino en Sicilio)

*Kio estas Esperanto?* – tekstis demando de kontrolo en lerneja kurso. La titolo de tiu ĉi artikolo estis unu el la respondoj. Esperanto iĝis **materio**, t.e. studmaterialo por ĉ. 600 lernantoj en la urbo *Mazara del Vallo* ekde la fino de januaro 2012. Itala E-Federacio invitis du instruistinojn por kvarmonata periodo, sed la kursojn mem komencis du aliaj kolegoj.<sup>1</sup> Raporto de mia koleginino aperis en *La Balta Ondo*.<sup>2</sup>

## Lernejoj kadroj

Instrui E-on en lernejoj kadroj estas granda defio eĉ por instruisto kun plurjardeka lerneja praktiko pri E-o kaj aliaj studobjektoj. En Mazara mi havis 17 studhorojn semajne, kun longeco de 45 ĝis 60 minutoj, en kvar lernejoj, 16 klasoj kun 351 lernantoj. (*figuro 1.*) Ege gravis la persona rilato kun la 25-kapa monstro, kiu povus fariĝi klaso de infanetoj (precipe se tiu plurjardeka praktiko de la instruisto disvolviĝis inter adoleskuloj). Mi klopodis memorfiksi almenaŭ la antaŭnomojn, montris intereson pri la individuaj kaj laŭgrupaj problemetoj, ebligis demandojn kaj respondis ilin.

	klas-kodo	lern-antoj	aĝo (jaroj)	stud-horoj
1.	SG 4A	25	9-10	16
2.	SG 4B	24	9-10	15
3.	SG 4C	26	9-10	15
4.	SG 4D	16	9-10	14
5.	SG 5A	25	10-11	16
6.	SG 5B	24	10-11	16
7.	SG 5C	21	10-11	13
8.	SG 5D	20	10-11	15
9.	SC 5A	20	10-11	15
10.	SC 5B	20	10-11	15
11.	SC 5C	20	10-11	15
12.	VA 1H	25	11-12	16
13.	VA 2I	24	12-13	7
14.	VA 3H	26	13-14	18
15.	VA 1I	23	11-12	17
16.	AL	12	17-18	13
	sume	351		

**figuro 1.** La grupoj de la aŭtoro

<sup>1</sup> Pri la organizado de la kursoj v. artikolojn en *Libera Folio*:  
<http://www.liberafolio.org/2010/mazara-volas-igi-cefurbo-de-esperanto#1304885726>

<http://www.liberafolio.org/2012/eu-financos-instruadon-de-esperanto-en-sicilio>

<sup>2</sup>Svetlana Smetanina: Sukcesa instruado de Esperanto en Sicilio,  
<http://sezonoj.ru/2012/05/21sicilio/>

Krom la licea grupo, la kursoj estis en la normala horaro de la lernantoj. Ne temis pri libervola elekto de la lernantoj, la tuta klaso devige partoprenis ĝin. Estis nova sperto por mi la integrema sistemo de la italaj lernejoj: en preskaŭ ĉiu klaso estis korpe aŭ mense handikapitaj lernantoj. Pro la deviga karaktero de la lecionoj en la motivado kaj disciplinado inter la lernantaro mi samtempe ĝuis avantaĝon de la situacio kaj havis kromajn malfacilaĵojn. Se Esperanto estas *materio*, oni ja kondukas tiel, kiel normale dum studhoroj. En granda parto de la klasoj mi ricevis apogon de miaj koleginoj. Se ili ĉeestis la kurson, tio rezultigis miraklan disciplinon, se ili montris intereson pri la laboro de la lernantoj, tio donis emon por plia lernado.

Mi transprenis la klasojn post 4-5 lecionoj, t.e. kvarono de la kursoj faris SZILVA Szabolcs kaj en lia foresto Konstantin TIĤOMIROV (en VA21 mi komencis instrui en marto). Ili perfekte enkadrigis E-on en la lernejoj: la lernantoj havis kajeron, ili kutimiĝis al la ritmo de la kurso, al hejmtaskoj kaj ili faris la unuan kontrolon.

### Lernejoj celoj kaj metodoj

„Dum la instruado de Esperanto ni klopodas atingi *praktikan* kaj *edukan* celojn. [...] Esperanto, kiel studobjekto, devas kontribui al tiuj *ĝeneralaj popolklerigaj* celadoj en kies kadroj ĝi okazas.”<sup>3</sup> Tio estas la bazo de ĉiuj miaj lernejoj aktivadoj.



<sup>3</sup> SZERDAHELYI István: Metodiko, en Gvidlibro por supera ekzameno, HEA Budapest 1979. p. 280.

IEF komprenigis, ke tiu bonŝanca instrueblo devas servi propagandajn celojn, cetere oni lasis nin agi libere koncerne la konkretigon de la celoj de la semestro, la kunmeton de instruplano, la elekton de metodo(j) ktp. (Tamen, post iom da tempo evidentigis, ke estus dezirinde pasigi al la lernantoj la baznivelan ekzamenon de la Itala Instituto de Esperanto. Fine tri kvaronoj de miaj plej aĝaj kursanoj ekzameniĝis.)

Do, mia ĉefcelo estis, ke E-o iĝu prestiĝa *materio*. Mi klopodis eksciti la scivolemon kaj eksperimentemon de la infanoj; doni al ili sukcesĝojn pro komunikado kun eksterlandano, en lingvo fremda por ili; instigi ilin al aktiveco, konscio, organiziteco kaj toleremo – do mi helpis la firmiĝon de la trajtoj bezonataj por esti sukcesa lingvolernanto.<sup>4</sup> Mi montris unuflanke interkulturajn novaĵojn helpe de E-o (ekzemple pri paskaj kutimoj en Hungario, pri Budapeŝto, per la maniero kiel mi gvidis la studhorojn kaj verŝajne per mia tuta eksterlingva konduto), aliflanke mi fortigis konojn lernitajn aŭ lernatajn dum aliaj studhoroj (ekzemple pri vortkategorioj en la itala, frakcioj, kontinentoj kaj sezonoj, per la E-lingva teksto de *Frat' Jakobo* ktp.). Danke al niaj nacia kaj lingva diferencoj, ni reciproke altigis niajn socian, socikulturajn, socilingvistikan, strategian kaj tekstan kompetentojn. (La laborlingvo de la studhora parto estis E-o, krom la tradukaj ekzercoj, altruditaj pro la ekzamentaskoj. En la postkurso, paŭza babilado la gelernantoj parolis ĝenerale en la itala kaj mi en E-o.)

Kompreneble centran lokon havis en mia celaro la praktika instruado de la lingvo mem. Mi provis aliri ĝin laŭ diversaj manieroj por alparoli lernantojn kun diversaj inklinoj. Ekzemple por demonstri la logikan kaj kreigan ecojn de E-o ni „analizis” radikojn, finaĵojn kaj afiksojn; ni malkaŝe parolis pri akordigo, pronomoj, prepozicioj, vortordo kaj akuzativo (vida-skriba-intelekta aliro). La komunika kuntekstigo de la gramatikaĵoj kaj leksikaĵoj okazis en scenetoj, dialogoetoj (aŭda-parolakinesteza aliro). La artemuloj havis okazojn desegni bildetojn, bildstriojn, faldi paperfoliojn.

La semantikan enhavon de la studhoroj mi elektis laŭ la aĝo de la lernantoj: sinprezento, aspekto, ŝatokupoj, familio, lernejo, bestoj kaj la tempo (la proporcioj de la lastaj du estis malsamaj en la diversaj lernejaĵoj tipoj). Mia supozo estis, ke la *tempo* devas interesi 10-13-jarulojn pro sia abstrakteco; ĝi devigas la lernantojn forlasi la sekuran grundon de la prezenco, kio donas la impreson de pli rapida alproprigo de E-o kompare

---

<sup>4</sup> v. en Manlibro pri instruado de Esperanto, ILEI, Hago, 2005. p.8.

kun aliaj lingvoj; ĝi estas ideala tereno ankaŭ por facile vastigi la vorttrezoron, konsciiĝi pri la strukturo de la nova lingvo kaj samtempe batali kontraŭ la interferoj de la itala kaj E-o en la prononco, ortografio k.s. Kiel menciite, ni estis liberaj elekti niajn celojn kaj metodojn – sed tiu libereco montriĝis ŝajna, ĉar ne akompanis ĝin libereco adapti la instru-kondiĉojn. Ni devis instrui cellingve (ni ne havis itallingvan akompan-anton) kaj per tre limigitaj instruhelpiloj. Lernolibro ne estis disponigita (kvankam ekzistas tre bona lernolibro por italaj bazlerneĵanoj)<sup>5</sup>; oni ne havis eblon kaj rimedojn por printado, ajna fotokopiado. E-lingvan presitan tekston miaj kursanoj vidis post tri-monata lernado, kiam alvenis de ILEI donaca stoketo da *Juna amiko*. Tio estis la venĝo de la alta kvanto de la lernantoj.

Estas imageble, ke mi aplikis ĉiujn lingvoinstruajn metodojn de la historio por progresigi la lernantojn kaj variigi la studhorojn. La ritmo (po unu horo semajne) ne estis sufiĉe intensa, la daŭro tamen riskis igi la kurson teda pro la cirkonstancoj.

La teknikaj kondiĉoj kaj la kutimaj enklasaj aktivaĵoj estis tre malsimilaj en la lernejoj. En SC funkciis neniu moderna tekniko, sed la klasĉambroj estis sufiĉe vastaj por formi grupetojn kaj fari movojn. La tieaj lernantoj havis sperton pri projekta laboro, kapablis memstare organizi sin. En SG estis malgrandaj, plenŝtopitaj klasĉambroj, kun malgranda tabulo kaj kreto, eblis nur tutklasa laboro, kun prezento de scenetoj. En la lasta monato mi malkovris, ke post aparta organizado ni povas iri en la komputilan ĉambron, kie disponeblas projekciilo kaj granda ekrano. Ni ekspluatis la unuajn du lecionojn de *Mazi* por fari ripeton kaj firmigi la lernitaĵojn. En tri klasoj de VA estis nur komputile uzebla blanka tabulo, kiu malfermis al ni la mondon, krome tiuj lernantoj kapablis labori kaj duope kaj grupete. Kun la liceanoj ni studis en salono de la asocio, ni uzis surmurigitan grandan paperon kiel tabulon, sed ankaŭ lernolibron.<sup>6</sup>


## Lerneĵaj rezultoj

Se Esperanto estas *materio*, al la ludreguloj apartenas ankaŭ kontroloj. Por la plimulto de la lernantoj estis ekscita evento la testado, multaj eĉ aparte lernis hejme antaŭ ĝi.

---

<sup>5</sup> Elizabetta VILISICS FORMAGGIO: Ludu kun ni! 1-2. E.R.A. 1994.

<sup>6</sup> J. C. WELLS: Jen nia mondo, Edistudio, Pisa



*figuro 2.*

La 1an kontrolon faris nia kolego post la 4-5a leciono, la 2an mi skribigis post la 10a. Ili estis atingaj testoj. La 3a estis kapableca testo fine de la studjaro, post 13-15 lecionoj.

### **La rezultoj de la 2a kontrolo**

La demandoj de la testo konformis al la studita problemaro de ĉiu klaso, t.e. ĝi havis praktike tiom da variantoj, kiom da klasoj. Ĝi ekzamenis tekstokomprenon, ortografian kaj morfologian ĝustecon. La statistiko pri la rezultoj subtenis la tiaman subjektivan prijuĝon. (*figuro 2.*) Normalan distribuon montras nur SG4A, tie kaj en SG5A, VA2I kaj VA1H estas grupeto de elstaraj lernantoj kun rezulto pli alta ol 80%. Tiom altan rezulton atingis neniu lernanto en 6 klasoj. Pli ol 50%-an mezumon havis 7 klasoj, kaj tio estas pliboniĝo kompare kun la unua testo. La plimulto de la lernantoj havis rezulton en la 20-60%a kampo, escepte SG4D, SC5B, VA1H kaj VA3H. La klaso SG4D estas unueca: kion ili sciis, ĉiu sciis, mankoj estis ĉe ĉiu (cetere dum la testado ili senbride kunlaboris). En SC5B estis iom pli da bonaj (kapablaj) lernantoj ol malpli bonaj. Du mezgradaj klasoj montris problemon. Laŭ la instruistino pri la angla, VA3H atingis similan rezulton ankaŭ en tiu lingvo. Ĉ. triono da ili ne estis motivitaj, ili apenaŭ sekvis la studhoron. (Tamen kursofine du trionoj preparis sin al la ekzameno de IIE kaj sukcese trapasis ĝin.)


La klaso VA1H havis nur 45-minutajn studhorojn, la testado okazis post la paskaj ferioj, tial mi proponis pli mildajn, eble tro mildajn taskojn.



La grupo VA1H komencis lerni en marto, tio estas la rezulto de ilia 1a kontrolo post la 7a studhoru, kiu enhave similis la 2an de la aliaj.

### La rezultoj de la 3a kontrolo

Per tiu testo mi intencis mezuri la evoluantecon de diversaj kapabloj grupnivele. La klasoj libere dividiĝis en 3–5-kapaj grupetoj por labori kune. [En VA3H du trionoj de la klaso preparis sin por la ekzameno, la teston



figuro 3.

faris nur la plej malfortaj.] Mi ne helpis ilin organizi la grupan laboron, sed mi helpis al ĉiu grupo kompreni la taskojn klarigante en Esperanto, se ili bezonis klarigon. Ili rajtis uzi ankaŭ propran kajeron. Estis unu nelingva tasko: ili devis rekonmeti distonditajn erojn de la kongresa faldfolio kaj poste laŭ ĝi skribi la daton de la Itala Kongreso okazonta en la urbo. La testo havis du variantojn: unu kun morfologia ekzerco kun la personaĵoj de Mazi por tiuj, kiuj spektis la filmon, kaj la alia kun morfologia-tekstokomprena tasko. Sur la testfolioj troviĝis 8 taskoj farendaj dum 50 minutoj. Estis testitaj en 3 taskoj interkultura kompetento, en 6/7 tekstokompreno, en 2 duonlibera sinesprimo, en 4 ortografio, en 7 morfologiaj konoj kaj en 3 vortrezoro.

La analizo koncernis 22 taskerojn; por kompari la rezultojn estis kalkulita laŭ la taskeroj la „boneco” de la kontrollaboraĵoj:

$$4(\text{bonaj solvoj}) + 2(\text{mezbonaj solvoj}) + (\text{malbonaj solvoj})$$

La mezumoj de la 2a kontrolo kaj la mezumoj de la boneco de la 3a kontrolo montras paralelan bildon, t.e. la plej sukcesaj klasoj en la 2a

kontrolo estis la plej bonaj ankaŭ en la 3a. (*figuro 3.*) Malpli bonan rezulton havas la grupoj en tri klasoj, pro tri diversaj kialoj. En SC la studhoroj okazis posttagmeze, la malĉeesto de lernantoj estis pli ofta; submetiĝis al la dua kontrolo pli kapablaj klasanoj, kiuj ne ĉeestis dum la tria. En SG5C la klaso havis post Pasko plurfoje alian okupon dum la tempo de E-studhoroj, do ili lernis kaj praktikis malpli ol la aliaj. Fine, en SG4D estis nur unu grupeto, kies anoj kapablis labori – pro konoj kaj pro disciplinemo – je akceptebla nivelo.

E-o iĝis por 600 siciliaj lernejoj normala studobjekto, kun mezurebla efikeco, kiel aliaj studobjektoj, ekzemple kemio. Estus bele, se el nia instruado rezultus almenaŭ tiom da e-istoj, kiom da kemiistoj formiĝas en lernejaj kadroj.<sup>7</sup> (*daŭrigota*)

*KOVÁCS Márta*



*Monique ARNAUD en la nomo de ILEI salutas la 79an italan kongreson de E-o en Mazara del Vallo. Dekstre: Laura BRAZZABENI –LKK.*

---

<sup>7</sup> La detala analizo de la 3a kontrolo aperos en la sekva numero – NDIR

## Tria instruvojaĝo al Indonezio (kaj Malajzio)

Preskaŭ du jarojn post la dua, kaj preskaŭ tri jarojn post la unua, mi faris trian instruvojaĝon al Indonezio. De la 29a de junio ĝis la 23a de julio mi vojaĝis al tri urboj en Javo kaj al la insulo Balio. En Bandung kaj Ĝakarto okazis po unu leciono por komencantoj, respektive la 30an de junio en la Muzeo pri la Konferenco Azio-Afriko [vd la *sekvapaĝan foton*], kaj la 3an de julio en la Universitato Gunadarma. En ambaŭ urboj okazis kunvenoj kun tiuj indonezianoj, kiuj partoprenis en la Universala Kongreso (entute partoprenis 13 indonezianoj, kio neniam antaŭe okazis). En Bandung mi aldone gvidis du lecionojn por komencintoj kaj helpis esplori hotelojn kaj kongresejojn por la unua Indonezia E-kongreso venontjare. Kune kun Fadir de la klubo 'Ruĝa Formiko' mi donis mallongan intervjueton pri E-o ĉe viva prezento de la radi-stacio Bobotoh en Bandung. Dume kelkaj aliaj esperantistoj disdonis faldfoliojn pri la movado en Indonezio.

Laŭ la planoj mi devintus iri ankaŭ al Malang kaj Probolinggo, sed pro tio ke mi rompis maleoloston dum ekskursita tago kaj ke tiuj vojaĝoj devus okazi en iom malfacilaj cirkonstancoj, mi restis tutan semajnon en Jogjakarto. Tio ne tute malutilis. Sekvis en tiu semajno du kunvenoj kun la e-istoj de tiu urbo. Tiel eblis decidi, kiam kaj kiel ili kunvenos por kune lerni. Pro tio ke antaŭ du jaroj la grupo fine neniam kunvenis, tiu fikso de datoj kaj loko estis tre grava. Menciindas ke ilia unua kunveno post mia foriro estis la 26a de julio, por samtempe festi la 125-jariĝon de E-o, kaj ke ili sukcesis venigi ĵurnaliston, kiu la 12an da aŭgusto aperigis artikolon pri E-o kun foto de la kunveno kaj kontaktdetaloj de la klubo. Ili tiam ankaŭ findecidis pri la nomo: 'La Verda Paco'. La lastan vesperon en Jogjakarto mi estis invitita al diskutgrupo, en kiu membras Yohanes MANHITU, jam konata E-poeto. La grupo kunvenas ĉiusemajne por diskuti pri lingvaj aŭ kulturaj temoj. Ĉi-foje mi enkondukis la temon (E-on... kompreneble). Sekvis interesa kaj vigla diskuto kaj iom da ekinstruado, ĉar la ĉeestintoj tuj volis havi pruvon pri la facileco de la lingvo... Helpis en tiu pruvado, ke kelkaj el ili tre rapide kaptis miajn klarigojn. Ilia entuziasmo igis ilin promesi, ke ili lernos plu la lingvon.

Du tagojn poste mi havis nur malgrandan grupon da interesiĝantoj en Balio por enkondukita kurso. Inter ili estis junulo, kiu jam mem eklernis la lingvon kaj antaŭe jam relative bone korespondis kun mi. Entute mia instruado malpli variis laŭ loko kaj ne atingis tiom da homoj, kiom dum

pasintaj fojoj, sed venis tempo pli kaj pli rigardi al jamaj lernantoj, helpi ilin kaj plifortigi jamajn klubojn. Plie, necesis klarigi pri UK kaj helpi kun la preparoj por la Indonezia E-Kongreso. Ĝojige estis ankaŭ, ke al la lecionoj por komencintoj venis homoj, kiuj antaŭe lernis nur solaj aŭ en la klubo, sed ne helpe de eksterlandanoj (ne nur mi, sed ankaŭ Tatjana Loskutova instruis en Indonezio, nome en la pasintjara somero).



De Balio mi flugis al Kuala Lumpur (ĉefurbo de Malajzio) kaj de tie rekte per nokta buso mi veturis al Teluk Intan, kie mi gastparolis en la ĉina lernejo 'San Min (Suwa)'. La lernejo havas E-klubeton, kiu lanĉis E-poŝtmarkon ĝuste en tiu tago, la 24an de julio. Mi parolis – angle – al la tuta lernejo pri miaj kialoj lerni E-on, miaj spertoj kun ĝi kaj pri ĝia 125-jariĝo. En la sekva vespero mi donis rapidlecionon kaj multajn klarigojn, kiel mem instrui al unuopulo, kiu volas lerni la lingvon kaj promesas ĝin poste mem instrui. Vere ŝajnas esti malpli facile varbi homojn en Malajzio, sed mi ankoraŭ revenos...

Por informoj pri la kongreso:

*<https://www.sites.google.com/site/iek2013bandung/>*

Informoj pri la movado en Indonezio:

*<https://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/>*

*Heidi GOES*

# El la landoj kaj sekcioj...

## Brazilo

Sojle de la baldaŭna fina aprobo de Leĝpropono 6162/2009 de la Brazila Parlamento, kiu enkondukas la elekteblan instruadon de E-o en la mezlernejoj, la Federacia Universitato de Braziljo (UnB) oficiale aldonis E-on al la ceteraj 12 lingvoj tie nun instruataj.

La precipa celo de la 180-hora kurso estas la aldona kapabligo de nunaj instruistoj de fremdaj lingvoj pri la instruado de Esperanto. La kurso estas por la ĝenerala publiko, sed kun speciala programo por lingvo-instruistoj en la tria lerno-semestro. Laŭcele la kursintoj kapablos aprobiĝi en nivelo C1 de la KER-ekzamenoj. La lecionoj okazos dufoje semajne, gvidotaj de profesoroj Paulo NASCENTES kaj Josias BARBOZA. Enmatrikul-iĝo jam eblas ĉe *unbidomas.net* (Ĉe *Cursos* musmontru *sequenciais*-E-o).

Tiu atingo malfermas vojon al eĉ pli grava alpaŝo por la evoluo de E-instruado en Brazilo, nome la postdiplomiga kurso por lingvo-instruistoj, kiun sugestis mem la estraro de UnB kaj kies pritraktado survojas.

*Raportis: Josias BARBOZA*

## Ĉeĥio



Post paŭzo mi denove sukcesis instrui Esperanton en la Filozofia fakultato de Universitato Masaryk en Brno ĉe la Instituto de lingvistiko kaj bal-tistiko. El 89 interesatoj komence de la printempa semestro pri la studobjekto *Esperanto I* restis 64. El tiuj, sukcese trapasis finan kolokvon 46 kaj ĉiu ricevis kvar poentojn, la ceteraj ne partoprenis eĉ unu el la ses

proponitaj kolokvoj. Mi instruis tradicie laŭ la video-kurso Mazi en Gondolando du horojn semajne kaj por ĉiu semajno studentoj ricevis hejmtaskon - konversacian temon. Post korekto ili rericevis la taskojn, por ke la studentoj vidu, kiujn erarojn ili faris kaj povu ilin eviti en la sekvaj

taskoj. La lastan temon „Vidindaĵoj kaj memorindaĵoj de via loĝloko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo - estu ĉiĉerono por via eksterlanda gasto” ili devis skribe prepari kaj rakonti dum kolokvo. Kiel helpilon mi disdonis al la studentoj la urban prospekton „Brno, la ĝusta direkto”. Unu studentino el Havlíčkův Brod diris, ke ŝi ĉerpis el la Esperanta vikipedio kaj ŝi miris, kiom da informoj ŝi trovis pri sia urbo. Plua tasko estis hejme rigardi en Vitubo la lastan lecionon „Mazi kaj la mistera planto” kaj rakonti en kolokvo. La tria parto de la kolokvo estis solvo de interaktiva testo [vidu la foton supre] „Mia amiko lernas” el *edukado.net* de Katalin KOVÁTS.

Por la aŭtuna semestro 2012 mi estas preparinta du studobjektojn: daŭrigan kurson *E-o II* (4 poentoj) kaj *Enkonduko en interlingvistikon* (3 poentoj).

Josef VOJÁČEK

## DR Kongo

La 19-an de julio 2012 en Kinŝaso okazis la 2a Esperanta Kultura Tago (EKT). Ni kaptis la okazon por sciigi al la partoprenantoj, ke E-o estas nun 125-jara. Tiukaze, estis dirite, ke la iniciatinto de E-o, L.L. Zamenhof publikigis, la 26-an de julio 1887 en Varsovio, sian unuan libron pri E-o, titolitan „Lingvo Internacia”. Li intencis faciligi la komunikadon, tial li kreis la lingvon, kiu estas sendependa, senlandlima kaj sufiĉe taŭga por krei pli bonajn rilatojn inter homoj diversdevenaj. Resume, mallonga historio de E-o estis legita por la partoprenantoj. Por la gelernantoj de E-o, tio estis okazo publike praktiki la lingvon kaj renkontiĝi kun aliaj esperantistoj el Kinŝaso kaj la regiono. Ni tutkore dankas al s-ro Horst GRUNER, kiu subtenis la manifestacion.

*Alexandrine OMBA kaj Rachel MAFULUKO, organizintoj*

## Pollando

La 27-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo okazis inter la 1-a kaj la 3-a de junio 2012 en la kulturdomo „Podgórze” en la tiunoma kvartalo. La temo de la aranĝo estis: „*Krakovo post 100 jaroj*”, ĉar ĝi okazis 100 jarojn post la 8a UK, okazinta en Krakovo en 1912. La aranĝon preparis kaj gvidis *Krakova Societo Esperanto*.

La programo estis riĉa, abunda kaj varia. La unua tago estis dediĉita al la 8a UK – okazis prelegoj pri ĝia historio kaj vizitado de la kongresejo, kie nuntempe troviĝas la sidejo de la Nacia Malnova Teatro. En la sama tago oni povis aŭskulti prelegojn pri Krakovo kaj ĉirkaŭaĵoj – la malgranda urbo Krzeszowice kaj historia salminejo en Wieliczka. Precipe

interesa estis esperantologia lekcio „*Pri kelkaj nezamenhofaĵoj en la nuntempa E-o*”, farita de Edward MALEWICZ – esperantologo, instruisto kaj metodikisto. Dum la dua tago okazis la pedagogia kaj metodika parto de la programo – lekciis d-rino Wanda JAKUBASZEK el la krakova Pedagogia Uni-



versitato pri „*La edukaj problemoj de postmodernisma kulturo*”, poste estis du etlecionoj de E-o por diversaj grupoj. La lecionon por plenkreskuloj prezentis Magdalena TATARA el Krakovo kaj tiun por infanoj - Jolanta KIERES el Nowy Sącz. En la tria tago okazis simpozio, kie oni prezentis prelegojn pri la uzo de E-o en la scienco, ekz. matematiko, juro kaj lingvistiko, i.a. prelegis d-ro Adam ŁOMNICKI pri E-aj fakvortoj en matematiko, d-ro Bronisław KIERES pri la historio de la jura sistemo en Pollando kaj prof-ino Ilona KOUTNY prezentis prelegon „*Ĉu E-o estas eŭropa lingvo?*” Okazis ankaŭ artaj programeroj: poezia vespero de Lidia LIGEŻA – poetino kaj tradukistino de pola poezio, koncertoj de klasika muziko faritaj de gefratoj KOLPANOWICZ: Julia – violonistino kaj Joachim – pianisto. Kortuŝa kaj belega estis la koncerto de Irena URBAŃSKA – krakova kantistino, kiu kantis ankaŭ en E-o polajn kaj judajn kantojn. Vespere okazis E-a Sankta Meso, kiun celebris pastro Roman GMYREK. La partoprenantoj kaj vizitantoj de la kulturdomo povis rigardi ekzpozicion preparitan de la estraro de la Pola Sekcio de ILEI, sub la titolo „*Esperanto kaj ĝia kreinto en la 125a datreveno de la kreado de la internacia lingvo*” [vd la foton – NdlR].

Ĝi estis preparita en la pola lingvo ĉar ĝi celis neesperantan publikon. La ekspozicio restis en la kulturdomo ankoraŭ kelkajn tagojn post la aranĝo, tiel multaj personoj povis rigardi ĝin. ILEI-Pollando prezentos la ekspozicion en la venonta universitata jaro en du krakovaj altlernejoj: en la Universitato Johano Paŭlo la 2a, kie ĝi akompanos sciencon konferencon pri instruado de fremdaj lingvoj, kaj poste en la Pedagogia Universitato.

*Magdalena TATARA – Pola Sekcio de ILEI*

## Tajvano

Finiĝis la dua semestro de E-kurso en la eksperimenta elementa lernejo, kiu apartenas al la nacia universitato en la suda urbo Pingtung en Tajvano. 12 lernantoj (11-12jaraj) partoprenis en la kurso, kiu okazis en ĉiuj vendredoĵ matene dum 40 minutoj kadre de kroma lecionaro. Ni uzis *Mazi en Gondolando* kiel lernomaterialon kaj vidis ĝin en Vitubo ĉiufoje. En la lasta sesio de la kurso, la infanoj rolludis la karakterojn en Mazi kun la ĉeesto de la lernejestrino kaj ĉiuj ricevis belan atestilon. La kursanoj havis leteran kontakton kun kelkaj lernejoj en aliaj landoj, ekzemple en Francio, Pollando, Rumanio, sed aparte sukcesa estis tiu kun Koreio, kies lernantoj (5 el 12) vizitis Tajvanon por renkonti la leter-amikojn. Detala raporto pri tio aperis en la lasta numero de *Juna amiko* kun fotoj. [pliajn detalojn vidu en *Ipernity kaj lernu.net* – *NdlR*]

*Instruisto kaj raportanto: Reza KHEIRKHAH*

## Komenio – du projektoj ekruĵas

Niaj membroj kaj partneroj ĉiam pli lernas kaj praktikas la arton prezenti aprobindajn projektojn al la eŭropaj subtenaj instancoj. Jen du projektoj kadre de Komenio (Comenius), kiuj disvolviĝos paralele tra la sekvaj du jaroj. Rimarku, ke la projektoj traktos la eŭropan integriĝon kaj personan evoluon; temojn alte taksatajn de la subtenintoj, kaj ne eksplicite traktas la instruadon de E-o – la lingvo fariĝas perilo, ne fincelo.

### Projekto 1: La diversaj profesioj kaj kiel aliri ilin

La akceptita temo estas: La diversaj profesioj – transformi la provokojn en eblon realigi siajn revojn. Partoprenas lernejoj de:

- Bulgario (Mariana GENCHEVA, projektpetinto – lernejo „Canko Cerkovski”),
- Rumanio (Mariana kaj Dimitru BERARIU – liceo „Ana Ipatescu”);
- Germanio (Christof KRICK – Gimnasium Winterberg und Medebach);

### PROJEKTO-LANDOJ





- Litovio (Gražina OPULSKIENĖ – Mazeikiu Merkelio Rackausko gimnazija);
- Svedio (Folke WEDLIN – Lerums Gimnazium) kaj
- Italio (Gaspero DOMENICHINI – Istituto statale di istruzione secondaria superiore della piana di Lucca ITCG Benedetti Is Majorana).



*Junaj bulgaraj esperantistoj, kun Mariana GENCHEVA kaj Rumjanka ILIEVA (instruistinoj) en Vieno survoje al Pollando, kie ili estis en majo 2011 por la 4a laborrenkontiĝo de la projekto „Gvidlibro de la amikeco”*

*Jen la diversaj agadoj de la projekto:*

- kvar laborrenkontiĝoj (en Bulgario – oktobre 2012, Italio – majo 2013, Germanio – oktobre 2013 kaj Rumanio – majo 2014);
- esplorado de la praktikoj en la karia disvolviĝo de la regionoj kaj de la partoprenantaj landoj; esplorado de la tendencoj de la laborkampo;
- organizado de konkursoj pere de eseoj kaj pentraĵoj; ellaborado de informtabuloj kaj lumbildaj prezentadoj (*PowerPoint*);
- organizado de metiejoj (*workshop*) kaj ellaborado de vivpriskriboj (*CV*) fare de la partoprenantoj;
- organizado de publikaj paroladoj – ni intencas helpi al la gejunuloj elekti ilian estontan profesion kaj ni volus montri al ili la vojon por ĝia ekposedo.

La partopreno en la projekto donos al la gejunuloj eblon orientiĝi kaj diag-

nozi la interesojn de sia personeco, pritaksi siajn eblojn kaj kompreni la motivojn por la elekto de siaj profesioj.

Dum ĝia realigo la gejunuloj havos eblon renkontiĝi kun samaĝuloj de aliaj EU-landoj; ili konatiĝos kun iliaj lingvo kaj kulturo, komprenos la neceson gardi la lingvan diversecon en Eŭropo kaj ricevos sciojn rilate al la edukaj, profesiaj kaj ekonomiaj ebloj proponitaj de Unuiĝinta Eŭropo. Ni atingos tion per la uzado de diversaj interaktivaj metodoj kaj per uzado de la neŭtrala internacia lingvo E-o, kiu donos egalajn eblojn de komunikado al ĉiuj partoprenantaj gejunuloj kaj al iliaj gvidantoj.

### **Projekto 2 – ne nur arĥitektura promeno**

La akceptita temo estas: *Vizito ekde la loka kastelo ĝis la Eŭropa Domo*. La projekto daŭros dum 2 jarojn de 2012 ĝis 2014 inter mezlernejoj en Herzberg am Harz en Germanio, Győr en Hungario kaj Mazaradelvalo en Italio. Kiel kvara partnero povos aldoniĝi lernejo el Zagreb, ili estas momente en atendolisto. Estas bela agnosko por la kvalite ellaborita projekto formulita de Zsófia KÓRÓDY kaj Ewa KUKIELKA el Herzberg, surbaze de spertoj el antaŭa sukcesa projekto inter 2008-2010.

ILEI sekvos la progreson de ambaŭ projektoj kaj volonte ekscios pri similaj translimaj iniciataj. Ili aperos en nia nove konstruota EduKalendaro.

## **Pri Kultura vojaĝo en Vjetnamio 2012**

„Kultura vojaĝo en Vjetnamio” estas la unua el (espereble) longdaŭra serio de ĉiujaraj „kulturaj vojaĝoj”, okazontaj antaŭ la Universalaj Kongresoj, pri la landoj de la kongresoj kaj iliaj kulturoj. Tiun iniciaton de „edukado.net” mi konsideris ekde komence gratulinda kaj interesa; tial mi entuziasme kaj scivoleme aliĝis al la kurso en la komenco de januaro 2012, malgraŭ tio, ke mi ne povos partopreni en la UK en Hanojo.

Antaŭ ĉio, mi uzis tiun okazon por reklami E-on inter miaj ne-esperantistaj geamikoj kaj konatoj. Oni ofte demandas min: „Ĉu vi kapablas nomi unu solan avantaĝon, kiun mi NE jam havas pere de la angla?” Kaj mi konfesas, ke tia demando ĉiam embarasis min antaŭ ol mi aliĝis al tiu kurso. Nun mi povas respondi: „Lernante Esperanton, vi havos i.a. la eblon aliĝi al bona prikultura kurso, ĉiujare pri alia lando, por lerni rekte el civitanoj de la koncerna lando pri ilia kulturo, laŭ la maniero, laŭ

kiu ili mem volas prezenti ĝin. Vi povos kontakti la ĉiĉeronojn kaj aliajn kursanojn pere de reta forumo kaj eventuale partopreni en granda kongreso en la koncerna lando, por sperti bone preparitan vojaĝon. Tia kurso kapablos riĉigi vian vivon diversmaniere, ĉar ĉiu lernanto elprenas el ĝi kion kaj kiom li aŭ ŝi volas aŭ bezonas.”

Por mi persone, la vjetnama mensa vojaĝo estis tre instrua, ĉar antaŭe mi sciis preskaŭ nenion pri la kulturo de tiu lando. Mi aparte ĝuis la lecionojn pri vjetnamaj tradiciaj muziko kaj danco akompanataj de ligiloj al filmoj, pri koncertoj, dancospektakloj, kantospektakloj, pupospektakloj ktp. Mi estas aparte danka pro la folkloro fabelo, kiun s-ro Aŭtuno (Nguyen Thu) arte tradukis por ni, kaj ankaŭ pro la bele ilustritaj tekstoj pri vjetnamaj bestoj kaj plantoj, bele tradukitaj de s-ino Alta (Cao Truong).

Mi sugestas, ke okaze de venontaj similaj vojaĝoj en la landoj de la UK-j, aliĝu ankaŭ kursanoj el la koncernaj landoj, eĉ grandkvante se eblas. Tiuj certe estus malpli scivolaj pri la enhavo mem de la kurso, sed eble ili interesiĝus pri la ĝenerala prezentadmetodo, tiel ke ili akiru la necesan kapablon gvidi la alilandanojn en sia lando, respondante kompetente kaj klare (en klara E-o) al plej diverstemaj demandoj. Mi proponas, ke almenaŭ unu fragmenton el la spektakloj prezentotaj pere de filmetoj, oni subtitolu en E-o, por ke la kursanoj komprenu iom pri kio temas en la kantospektakloj, pupospektakloj ktp. Kadre de la estontaj lecionoj pri tradiciaj manĝaĵoj, mi ŝatus trovi ankaŭ kelkajn tradiciajn receptojn, el kiuj almenaŭ 2-3 estu tre facile kaj rapide prepareblaj. Kiam temos pri tre apartaj ingrediencoj troveblaj (preskaŭ) nur en la koncernaj landoj, oni povos aldoni konsilojn pri anstataŭaĵoj de tiuj ingrediencoj. Tiamaniere, ĉiuj kursanoj povos gustumi almenaŭ unu tradician manĝaĵon en sia hejmo. La vegetaranoj kutime scipovas anstataŭigi viandon per fungoj, kaŝtanoj, melongenoj, migdaloj ktp. Malgraŭ tio, estus ege bonvene prezenti ankaŭ kelkajn receptojn, kiuj ekde komenco estis elpensitaj senviande. Kvankam la plenumado de la perkomputila vojaĝo antaŭ la reala vojaĝo ŝajnas al mi la ideala cirkonstanco, ankaŭ la inversa ordo povas esti tre bona (laŭ multaj personoj, ĝi povas ŝajni eĉ pli taŭga). Povas esti, ke ĝuste dum la UK multaj personoj iĝos scivolaj koni pli bone la vjetnaman kulturon, tiel ke oni aliĝos amase al la kurso ĝuste en Hanojo. Eble estus bone disvastigi inter la partoprenontoj de la hanoja UK demandaron, kiu aspektus pli-malpli tiel:

*Kial vi ankoraŭ ne aliĝis al la Kultura Vojaĝo en Vjetnamio?*

*A. Mi ne sciis pri la kurso.*

*B. Mi ne havis tempon ĉi-jare por la kurso; neniu informis min pri la eblo ricevi la tutan materialon post la aliĝo kaj lerni ĝin tiam, kiam mi havos tempon.*

*C. Min ne interesas la kurso.*

*D. Aliaj kialoj. Kiuj?*

Gratulon al la grafikisto Francisco VEUTHEY, kiu kreis la belegan logotipon de „Kultura Kurso en Vjetnamio”. Ĝi povus iĝi tre arteca insigno, kiun multaj homoj (inkluzive min) ŝatus porti, por reklami tiun kurson kaj ĝenerale Esperanton. Koran gratulon kaj dankon al la tuta teamo de „edukado.net”, kiu organizis tiom belan kaj ĝuindan kurson. Bondezirojn por la estontaj agadoj, kaj ĝis revido... en la islanda vojaĝo!

*Luiza CAROL*

## Recenzoj

*Elemente de esperanto por românofoni, Ionel Oneț. Eld. Charta, Sfântu Gheorghe, 2011. ISBN: 9789738326767. 49 p. Prezo ĉe UEA: € 4,50*

La libreto estas bona memorhelpilo por tiuj, kiuj plenumis nur kelkajn lecionojn pri E-o. Ĝi enhavas ĉiujn elementojn de Esperantaj fonetiko kaj ortografio, 15 el la 16 bazaj gramatikaj reguloj starigitaj de Zamenhof (mankas nur la regulo pri apostrofo, kiu rilatas al poezio, do ne eniras la intereskampon de la unuaj lecionoj) kaj tiujn elementojn de morfologio nepre parkerindajn ekde la komenco (pronomojn, numeralojn, prepoziciojn, konjunkciojn, afiksojn, kelkajn adverbojn strikte necesajn). Specialan lokon okupas la tielnomataj „korelativoj” kaj la verbaj participoj, klarigitaj simple, kun klaraj ekzemploj tradukitaj en la rumanan.

Krome, la leganto povos trovi utilajn informojn pri „La unua libro” en E-o, eldonita en 1887, samkiel pri la plej grava vortaro de la lingvo, Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Se mi havintus ĉi tiun ilon kiam mi eklernis la lingvon, verŝajne mi pli rapide komprenintus la uzadon de prepozicioj (per tre bonaj ekzemploj por diversaj signifoj, tradukitaj en la rumanan) kaj eble mi alkiutimiĝintus pli facile al la verbaj participoj (tre bone klarigitaj en la rumana). *Elemente de esperanto por românofoni* estas utila ilo por komencantoj, kies denaska lingvo estas la rumana.

*Luiza CAROL*

*Ni semas kaj semas... Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj 1921-2011, Sylvia Hämäläinen, Eld. ELFI, Hensinki, 2012. 108-paĝa, 21 cm. Ilustrita. ISBN 978-952-93-0364-9.*

Per ĉi tiu verko nia finna sekcio donas al nia trideko da aliaj sekcioj modelon, kiel ne perdi nesaveble sian fruan historion. Tio estas leciono, kiun ankaŭ la internacia ILEI lernu, ĉar ĝi nun penege provas rekonstrui la eventojn de precipe siaj unuaj dek jaroj.

La libro havas komence kronologian parton, kiu arigas amason da konkretaj faktoj laŭ la jardekoj, sed kiel konfesite en la enkonduko, restas truoj; pri esencaj aferoj foje mankas dokumentado, dum foje efemeraĵojn oni prinotis detale. Plie, kelkfoje diversaj informfontoj kontraŭdiras unu la alian – malfacilas la vivo de historiisto. La dua parto prenas laŭteman aliron, foje kun ripetitaj informoj, foje aldonante pliajn. La ĉefaj temoj estas eldonadoj, kontaktoj kun la edukministerio (intensaj), kursoj kaj klasoj kaj la internacia kunlaboro (tre ampleksa).

Tion atestas la panteono de kursgvidintoj aŭ prelegintoj tra la jaroj: Lapenna, Becker, Markarian, Sonnabend, Cseh, Szerdahelyi, Morariu, Blanke, Sekelj, Barcsay, Tonkin, Støp-Bowitz, Wood, Kovács, Pettyn, Silber, Bronstein, la nuna recenzanto kaj dekoj da pliaj kiujn ne eblas listigi plene. La aktiva plektiĝo de eminentuloj el UEA-rondoj en finnaj edukaj iniciatoj demonstras, ke la nunaj streboj de ILEI direkti la fokuson kaj prioritaton sur instruadon ne temas pri epokfara novaĵo; ĝi celas fakte restarigi tion, kio ekzistis antaŭ jardekoj. Nur tia historia perspektivo konsciigas nin pri tio.

La nuna verko distilis la koneblon en sekveblan logikan strukturon, kaj identigas por ni niajn ‘konatajn nekonataĵojn’. Ĝi plie elstarigis por ni kelkajn nekonitajn faktojn pri la internacia ILEI. Ĝi ekzemple konfirmis nian supozon, ke la fondo-kunsido de ILEI okazis en Bournemouth, Britio, kadre de la 34a UK. Ni eksciis la sekciojn en la periodo 1950-51: la britan, francan, germanan, nederlandan kaj svedan. Jam tuj Finnlando estis plektita en aferojn, kaj dekomence havis komitatanon – reprezentanton



Joel Villki, sed ŝajne (jen iaj kontraŭdiroj) la sekcia aliĝo okazis nur en 1952 kun nomumo de la komitatano Hannes Koivu. La nederlandano P. Korte starigis jam en 1945 kontakton kun Vilkki, en 1948 Koivu havis kontakton kun belgaj instruistoj. Elstaraj eventoj estis i.a. oficiala eksperimento en Somero – la urbo, ne la sezono – (1958-63), la eldono de Privilegia Vojo (1959, Setälä), la internacia projekto Grajnoj en Vento (en la sesdekaj jaroj), kaj pli lastatempe aktivado en la projekto Euroscola.

La libro estas ilustrita, kun fondo-dokumentoj, stampoj, kovriloj de lerniloj kaj bildoj de renkontiĝoj, ne nur movadaj (ekzemple Claude Piron kun gitaro en kurso el 1987) sed ankaŭ oficialaj (ekzemple delegacio de EAF ĉe ŝtatrezidanto Kekkonen en 1973, kiu specife demandis pri la tiama 5-landa instrua eksperimento). Librofine aperas resumoj en la finna kaj sveda, listo de mallongigoj kaj de konsultitaj fontoj. Por serioza esplorado, dezirindus serĉebla, indeksita, elektronika versio. Resume, valora spegulo pri niaj pioniroj kaj ilia heroa laboro!

*Stefan MACGILL*

### **ILEI – kelkaj konataj nekonataĵoj**

1. Ĉu la kvin sekcioj el 1950 estis fakte la fondo-sekcioj de la Ligo?
2. Kia estis la Statuto ekde 1949 ĝis la komenco de niaj konoj el 1989 (Montpeliero). Ni devas supozi, ke ĝi havis alian strukturon, ĉar reprezentantoj rajtis fariĝi komitatanoj, krome ĝi antaŭvidis ne nur Komitaton kaj Estraron sed aldone Ĝeneralan Asembleon (kun veraj rajtoj).
3. En kiuj jaroj aldoniĝis novaj sekcioj? Kiom ILEI havis laŭjare?
4. Kiuj estis la estraranoj de ILEI inter 1952 kaj 1998? Ni scias la fondo-estraron, sed ne pli. Kiom ofte kaj kiel oni elektis ilin – rotacie aŭ bloke?
5. Kiam okazis la unua konferenco de ILEI – ĉu 1966? Ni scias, ke la deka okazis en 1976, kaj ekde tiam ni scias la urbojn, nombron da partoprenontoj, kaj temojn. Kie okazis niaj konferencoj ekde 1966 ĝis 1975? Ni malkovris kelkajn: 1968, St. Andreasberg, Germanio, 1969 Helsinki, Finnlando (kunsido en UK), 1970 Maribor, Jugoslavio, 1971 Londono (kunsidoj en kaj apud UK), 1974 St. Andreasberg, Germanio, 1975 Humlebæk, DK, mankas 1972 kaj 1973. Ĉu okazis signifaj renkontiĝoj antaŭ 1966?

### **La 28-a KER-sesio en Slovakio**

La 28an sesion gastigis la aranĝo Somera Esperanto-Studado en la slovakia Nitra. Gvidis ĝin Márta KOVÁCS kunlabore kun Petra SMIDÉLIUSZ.

Je tiu okazo entute 17 personoj trapasis la ekzamenon je nivelo B1 (5), B2 (4) kaj C1 (8). La kandidatoj venis el 12 landoj: 4 francoj, po du katalunoj kaj poloj kaj po unu italo, hispano, slovako, litovo, hungaro, ruso, ĉeĥo, brito kaj germano.

### **La 29-a KER-ekzameno en Hanojo**

Dumkongrese okazis la 29a KER-sesio, kiun je granda ĝojo de la organizantoj kaj 9 kunlaborintaj kolegoj partoprenis multaj aziaj kandidatoj. Aperis ankaŭ la unuaj afrikaj ekzameniĝintoj. Sume temas pri 37 trapasintoj el 18 landoj je niveloj B1 9 personoj, 13 je nivelo B2 kaj 15 je nivelo C1. Tiun belan kvanton de kandidatoj ne eblintus atingi sen la malavara helpo de 8 asocioj kaj individuoj kiuj subtene reagis al la alvoko de *www.edukado.net* kaj finance ebligis komplete aŭ parte la ekzameniĝon de 23 kandidatoj, ĉefe el Vjetnamio, sed ankaŭ el Afriko, Indonezio, Malajzio, Ĉinio kaj Singapuro. En la nomo de la kandidatoj ni kore dankas pro la helpo Synnöve MYNTTINEN, Esperanto-France, Humphrey TONKIN, Renée TRIOLLE, asocion Espéranto-Vendée, Andrea BERTRAND, Liliane ALAZRAKI, Rob MOERBEEK kaj Mireille GROSJEAN.

### **La 30-a KER-sesio okazinta en Sicilio**

Fine de la Itala Kongreso, organizita en Mazara del Vallo, Sicilio, okazis la 30-a KER-sesio, kun la partopreno de 9 personoj el 7 landoj. Sur B2-nivelo ekzameniĝis du rusinoj kaj sur C1-nivelo po unu ruso, brazilano, danino, svedo, aŭstralianino, kostarikano kaj katalunino. Interesaĵo de la sesio estis, ke aldoniĝis la 60a lando, Kostariko, al la listo de landoj, de kie ni havis jam kandidatojn. Kadre de la KER-sesioj ĝis nun estis ekzamenataj entute 986 personoj. Ni antaŭvidas la 1000-an kandidataton por decembro en Moskvo.

### **Paroligaj kursoj dum UK en Hanojo**

Dumkongrese jam tradicie okazigas paroligajn kursojn la portalo *www.edukado.net*. En la 16 lecionoj de la retejo partoprenis tage je ambaŭ niveloj po 70-80 personoj, lernemuloj kaj observantoj de la metodoj de Katalin KOVÁTS kaj Sylvain LELARGE. Dumkongrese okazis ankaŭ duhora

preparsesio por la ekzamenkandidatoj. Per sia reta kaj surloka agado la retejo edukado.net multe kontribuis al la altigo de la lingvonivelo de la kongresanoj.

*Raportis: Katalin KOVÁTS*

## Reago

„En redaktora enkonduko [vd. IPR 2012/1] vi ankaŭ atendas niajn opiniojn. Se temas pri ŝparado, jen du simplaj solvoj sen tuŝi la kvaliton de la enhavo. La papero povus esti pli malmultekosta. Kaj, pri la amplekso de la artikoloj klaras, ke estas pli malfacile skribi pli mallonge, sed tion oni povas prave postuli de ĉiuj aŭtoroj. Certe ne estas hazardo, ke miaopinie la plej prudenta kaj utiligebla artikolo en la sama numero estas samtempe unu el la plej mallongaj [tiu de Germain PIRLOT]. Por pli efika laboro estus pli bone, se la mallongigojn farus la redaktoro kaj ne la Scienca Komitato aŭ alia organo.”

*Lajčo IMRIĆ (Serbio)*

## ILEI labortable

### **ILEI ĉe la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo**

Konferenco de ALTE okazos en Munkeno (20-23 nov.) kun partopreno de nia estrarano, kiel reprezentanto de ILEI kaj UEA. Jen eblo sondi pri nia deziro akiri gradon de oficialeco por la movadaj iniciatoj pri instruista trejnado.

### **Rumanoj simpozios – ni partoprenos**

Du estraranoj de la Ligo partoprenos en la nacia simpozio de la rumanaj esperantistoj, en Răscruți, apud Cluj de la 5a ĝis la 7a de oktobro. La temo de la simpozio estas *'Esperanto kaj edukado'*.

### **Estrarkunsido en Slovakio**

La estraro formale kunsidos inter la 14a kaj la 16a de novembro, en Modra-Harmónia, Slovakio, tuj antaŭ KAEST (15-18 nov.), kies temo estas *'Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj'*. Vidu: <http://kaest.ikso.net>. Ni rekomendas la aranĝon al niaj membroj! Proponoj por la estrara tagordo bonvenaj!



## ILEI-konferenco 2013

La 46a Konferenco de ILEI okazos en Germanio, de vendredo la 12an de julio ĝis ĵaŭdo la 18an de julio en Herzberg-Sieber, pitoreska, montarvala parto de Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo. Ĝia temo estos: ‘Dumviva lernado: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj’. Pli ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info).

## Nova membro-kategorio

Ekde 2013, ILEI ofertas novan membrokategorion por la kvardeko da landoj kun la plej limigita pagipovo. Tion la komitato akceptis per reta voĉdono finiĝinta en la 31a de aŭgusto. Membreco por A- kaj B-landoj restas senŝanĝa; tuj kiam eble, la preciza kategoriigo de la landoj aperos en nia retejo. Praktike la ŝanĝo signifas, ke ĉiu membro pagos ion. La ligo uzos la Kolegheplan Kason por kompletigi la kotizojn de C-landanoj, por ke ili atingu la nivelon B. Jen la nova skemo:

Membro-kotizo	A-landoj	B-landoj	C-landoj
Kun reta IPR	€ 10	€ 5	€ 1
Kun papera IPR	€ 20	€ 10	€ 2

# Informoj pri ILEI

## Laborkomisionoj

**Ekzamena:** Mireille Grosjean (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Karine Arakelian (sekretario, arkivisto), Leysester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

**Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Tiekko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

**Kontrola:** Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot.

**Lerneja:** Julián Hernández (gvid.), Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tiekko Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

**Regulara:** Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas (Estrare: Stefan MacGill).

**Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: *vakas*).

**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Aida Ĉiĝikaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petroviĉ, Kristin Tytgat.

## Kunlaborantaj institucioj

**EEU:** *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi).

**E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, [info@ikso.net](mailto:info@ikso.net).  
Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

**Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj  
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.  
Retadreso: [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).

**ICH** (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnsejtoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, [zsafia.korody@esperanto.de](mailto:zsafia.korody@esperanto.de).

**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Bharat Ghimire**.

**TEJO** (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

**UEA**: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, [www.uea.org](http://www.uea.org). Observanto kaj A-komitatano de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

**UN** (Unuiĝintaj Nacioj): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek**, **Ron Glossop**, **Leysester Miro**.

**UNESKO** (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, [francois.lojacomo@wanadoo.fr](mailto:francois.lojacomo@wanadoo.fr); **Monique Arnaud**, Ecole Chemin de l'Espérance, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, [monique.arnaud@aliceadsl.fr](mailto:monique.arnaud@aliceadsl.fr); **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

## Membreco kaj pagado por aliaj servoj

**Membreco kostas 20 € en A-landoj** (laŭ UEA-difino) **kaj 10 € en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 10 € por la A-landoj kaj 5 € por la B-landoj. Por C-landoj, v. paĝon 40.** Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por *Juna amiko*. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <[ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com)>.

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

\* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

\* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldonde de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*), pike-b (projekto *Interkulturo*).

\* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.

El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS.

Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

\* Simpla abono de IPR sen membreco: 20 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

## Redakciaj informoj

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redakto**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <[zozefo.nemeth@gmail.com](mailto:zozefo.nemeth@gmail.com)>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <[moerbeekr@gmail.com](mailto:moerbeekr@gmail.com)>.

**La nunan numeron ni sendis al la presejo la 17-an de septembro 2012, redaktfino por la sekva numero: la 15 novembro 2012.**



*Alexandrine kaj Rachel en la 2-a E-a Kultura Tago en DR Kongo (vd p.30)*



*Grupeto de gelernantoj de Heidi GOES en la insulo Balio (vd p.26)*

